

KUNSAVANTOJ

Antonio Rudoni

Ĉiuj tiuj, kiuj amas tiel, kiel amas Jesuo, kunlaboras kun Li je la savo de la mondo, por ĝin liberigi de la maljusteco kaj morto. Ili estas do fare de Li redemtitaj kaj kun Li estas kunsavantoj.

Laŭ ekzemplo de Maria

Laŭnature, kiu pli multe amas, pli multe kunlaboras. Pri la senmakula Kunsavintino tio validas plej maksimume.

Kaj kiel Ŝi, ĉiuj disĉiploj de Kristo estas en diversa mezuro kunsavantoj jam ĉi tie surtere, aŭ kiam ili atingis supron de la amo enĉiele.

Sur ĉi tiu mondo la Patrino de nia Sinjoro Lin atendadis, naskis, edukis (ŝokas min la penso, ke la homa persono povis edukadi mem la Dion, kiu iĝis homo, por restadi inter ni): Ŝi edukis Lin helpe de Dia gvidado kaj kunlaboro kun sankta Jozefo. Maria poste suferis kun krucumita Jesuo, ĝojegis pro lia resurekto kaj kun fizika ĉeesto Ŝi preĝadis kune kun naskiĝanta Eklezio. Tiom da aferoj Ŝi sciigadis al la unuaj kristanoj, kunlaboris kun ili ĝis fino de sia surtera vivo kaj estis ĉielprenita, por ke Ŝi kunlige kun sia Filo atendu nian resurekton. Tial Ŝi akiris la plej altan plenecon de la amo. Kaj tio estas motivo, kial Maria tiel helpas sur la mondo al la homoj, kiuj estas ŝiaj infanoj, eĉ se ili ofte tion ne konsciigas. Ŝiaj oftaj aperadoj kunigitaj kun mirakloj materialaj kaj spiritaj estas evidentaj signoj de ŝia insistanta zorgo pri ni. Ŝia kunlaboro kun Jesuo je nia savo el tiu ĉi mondo estas ĝuste ŝia kunsavanteca verko, kiu transformigas la teron kaj preparas la ĉielon en kunigo kun Jesuo Kristo, ununura Redemptoro.

Nia alvokiĝo

Nia kunsavanteco certe ne estas tiel grandanima kiel ŝia. Tamen la Sinjoro postulas de ĉiu el ni ankaŭ nian kontribuon, aŭ malgrandan, aŭ grandan. „Kiu kredas al mi, tiu faros agojn, kiujn faras mi, jes, ankoraŭ pli grandajn li faros“ (Joh 14, 12).

Ni ekpensu la agadojn de la apostoloj, martiroj, sanktuloj, kiuj daŭrigis la verkon de la Savinto ne nur en la spirita nivelo, sed ankaŭ en la nivelo surtera: tiom el ili helpadis al malgranduloj, malsanuloj, malriĉuloj kaj suferantoj. El tiuj la plej lastaj ni memorigu patrinon Tereza el Kalkuto.

Kaj kiel ni persone povas kunlabori kun Jesuo? Antaŭ ĉio se ni vivas bone nian vivon plenumante tiujn taskojn, kiujn ni estas devintaj plenumi. Sankta Francisko Salesa diradis: „Ni devas scipovi flori tie, kie nin Dio enplantos.“ La rubisto faras la mondon pli belan per tio, ke li purigas laŭeble plej bone la urbon kun deziro ĝin purigi por bono de ĝiaj loĝantoj, simile la fervojisto, terkulturisto, teknikisto: ni faru kun elano nian laboron por prospero de tiuj, kiuj el ĝi havas utilon.

Nia tasko

Iuj do estas vokitaj, por helpi persone: instruistoj, pastroj, kuracistoj, socialaj laborantoj..., tiuj memoru pri ekzemplo de Jesuo. Tamen ĉiuj kristanoj devus pripensi 5-an kaj 6-an ĉapitron de la evangelio laŭ sankta Mateo, kiu enhavas grandan parolon de Jesuo.

Ĝi estas adresita al malriĉuloj, afliktitoj, pacemuloj, al tiuj, kiuj malsatas kaj soifas pri la justeco, al kompatemuloj kaj la homoj de la pura koro, al farantoj de la paco kaj persekutatoj pro justeco, al ili apartenas la Dia regno kaj je ili dependas savo de la mondo. Ni estas vokitaj, por esti salo de la tero kaj lumo por la mondo.

La geedzoj estas vokitas al fideleco, ĉiuj estas vokitaj al la amo kaj por ami ankaŭ siajn malamikojn. Sed ankaŭ tiuj, kiuj ŝajnas senpovaj kaj malsanaj, povas fari tre multe per sia preĝo kaj sia sinfordonemo en la volon de Dio.

En tio ni iĝas similaj al Jesuo kaj Maria: ni kunlaboras kun ili kiel „kunsavantoj“ por bono de ĉiuj. ■ *El Maria Ausiliatrice 4/2008*